


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • (821) 2, marto – aprilo 2000



INTERVJUEO DE NIA IAMA PREZIDANTO HENK DE HOOG

oOo

**AŬRELIO AŬGUSTINO PRI LA TEMPO
PROTESTANTA MONAĤISMO
EKUMENISMO • RAŬMISMO
LA KELI-JARRAPORTO**

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta
kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Adolf BURKHARDT, ✉ Gimpelweg 1
DE 73235 Weilheim an der Teck, Germanio;
☎ +49 7023 72413

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ javadi@worldonline.nl

Kasisto (kaj matrikulisto): Siegfried KRÜGER,
✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688; ✉ keli@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimуме € 15,-

☉ Membro-subtenanto € 22,- ☉ Nura abono:
pagante rekte al KELI € 12,-; pagante al Librese-
rvo € 14,-. Mensejoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI ☉ Se
estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe
UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto
kelk-p de KELI ☉ Nederlanda poŝtĝirkonto de
KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON,
✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340, Nouaillé-
Maupertuis, Francio; ☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Manuskriptojn oni sendu nur al la Redaktoro!
Abonprezo sen membreco en KELI: € 12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe,
ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Kompostado, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo „HEJME” Kazimierz LEJA,
✉ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando
☎ +48 (0)605 305 950; ✉ kleja@post.pl

ENHAVTABELO

p. 3 **HENK DE HOOG 90-JARA**
Laŭ intervjuo, la vivo de nia
iama prezidanto de Leen HORDIJK

p. 5 **KONFESIOJ, libro 11, de Aŭrelino
Aŭgustino (354-430)**
Malnova teksto pri la tempo,
en traduko de Gerrit BERVELING

p. 8 **LA ENKONDUKO DE
MONAĤISMO EN LA FRANCA
PROTESTANTISMO**
de Michel CLÉMENT

p. 10 **KOMUNA DEKLARO PRI LA
DOKTRINO DE PRAVIGO**
La esperantistoj diskutas pri ekumenismo
de Adolf BURKHARDT

p. 12 **EKUMENISMO DE KVAKERA
VIDPUNKTO**
Kiu celo el ekumenismo?
de Martin HOWARD

p. 14 **ĈU IO BONA POVAS VENI
EL RAŬMA?**
Marco PICASSO donas sian komprenon
de raŭmismo

p. 19 **Paketradio: nova speco de
transsendado de informoj
kaj de komunikado**
de Jozef WOZNICKA

p. 20 **Sekretaria jarraporto
pri la jaro 1999**
kaj recenzoj, kaj informoj.

Redaktoraj vortoj

Karaj, finpreparante ĉi tiun numeron,
post epizodoj diversaj, mi finis, kiel decas,
per la enhavtabelo, kiun vi trovas ĉi-supre.
Kaj mi konstatis, ke malgraŭ mia impresoj,
la enhavo estas interesa kaj varia. Mi do de-
vas danki al la diversaj verkintoj. Koregan
dankon en via nomo, de ĉiuj.

Plej korajn paskajn salutojn.
Li releviĝis!

HENK DE HOOG 90-JARA

Jam delonge mi intencis viziti Sinjoron Henk
DE HOOG. Finfine mi telefonis al li. Be-
daŭrinde li rifuzis. Li estis deprimita ĉar li
estis atendanta vidaparaton. Preskaŭ li ne-
nion vidis. Por almenaŭ iom vidi li dependis
de la vidaparato kiu dum monatoj estis pro-
krastita pro diversaj kialoj. Mi ege bedaŭris
lian decidon, sed mi komprenis. Tamen kel-
kajn tagojn poste li retelefonis kun ĝojiga
voĉo: „ĉu vi ankoraŭ estas preta viziti min?”
La longe sopirata aparato venis.

Sabaton la 31-an de januaro 2000 mi vo-
jaĝis al Castricum (Kastrikum) al lia eta do-
mo, la plej alta sur la sepa etaĝo. Ni trafis
unu la alian en la granda halo. Li ĝuas rela-
tive bonan sanon, tamen lia dorso kaj dek-
stra genuo ade doloras pro arteriosklerozo.
Lia vidpovo sen la aparato estas limigita,
nur 10% de la normala. Sed lia cerbo kaj
memoro tre bone funkcias. En lia granda
loĝĉambro kun bela elvido sur la verdaj
herbejoj en la malproksimo ni parolis pri lia
longa, laborema vivo.

Li naskiĝis la 24-an de marto 1910 en la
banloko Scheveningen apud Hago en gran-
da ortodoksa protestanta familio de panba-
kisto. Li estas severe edukita, ni dirus, kiel
kutime tiutempe. Post la mezlernejo li vizi-
tis la pedagogian lernejon por instruisto.
Dum lia tuta vivo li restis fidela al la instru-
ado de junuloj. Oni ja povus diri: li estas
instruisto ĝisoste. Li okupis sin speciale pri
instruado en kristanaj lernejoj. En 1928 li
fariĝis instruisto de bazlernejo en sia na-
skiĝloko. Post dektri jaroj li transloĝiĝis al
Amsterdamo por instrui en mezlernejo kaj
finis sian karieron kiel lernejestro. Li pen-
siigis en 1975 post pli ol kvardek laborjaroj
en la instruado.

Dum longa tempo, ekde sia junaĝo li stu-
dis violonon. Li multe kunludis en piano-
trioj kaj en amatora simfonia orkestro kaj

aŭdigis multajn klasikajn komponaĵojn. La
ludado de violono ne estas facila, speciale
ne en orkestro, ĉar la dirigento iam atentis
pri la egaleco de la arĉoj. En 1943 lia violono
estis ŝtelita elde la lernejo. Post tiu perdo
li ne plu aĉetis alian violonon, ankaŭ por
tempomanko. Estas rimarkinde ke maljunaj
konatuloj, kiuj rememoras lin el Schevenin-
gen, ankoraŭ scias pri lia violonludo. Ren-
kontante ilin, ilia unua reago estas: „ĉu vi
ankoraŭ ludas violonon? Vere, vi povis be-
lege ludi!”

En 1934 li edziĝis kun Maria LEMS el
Rotterdam. Naskiĝis tri infanoj el kiuj du fi-
linoj. Estas rimarkinde ke lia filo kaj unu
bofilo fariĝis universitataj profesoroj; kaj el
liaj genepoj jam kvar verkis disertaciojn kaj
doktoriĝis.

En 1937 estante longdaŭre malsaneta, li
aŭskultis radio-elsendon pri Esperanto. S-ro
P. HEILKER, katolika bazlernejestro instru-
is E-kurson kaj ekde tiam Henk akiris sian
amon al Esperanto. Li sukcesis en 1938 por
la A-diplomo kaj unu jaron poste por la B-
diplomo kun plej altaj poentoj. En la *Kristana
Gazeto* de 31-a de majo 1938 aperis listo
de sukcesintoj: i.a. H.A. DE HOOG el Sche-
veningen kaj A. STORM el Vlaardingen
(nun Veenendaal kaj ankoraŭ KELI-ano).
Dum multaj jaroj li studis vespere respekti-
ve por la instrudiplomoj por mezlernejoj pri
la lingvoj nederlanda, franca, germana, an-
gla krom matematiko kaj religio. Poste li
pristudis ankaŭ la svedan, italan kaj hispa-
nan lingvojn.

ESPERANTO-VERKAĴOJ

Henk DE HOOG multe verkis en sia longa
vivo. Ne estas eble priskribi liajn verkaĵojn.
Mi nomas nur kelkajn. Li prenis sur sin pri-
skribi la historion de KELI. Dum jaroj
(☎ 4)

aperis artikolserio en *Dia Regno*, kiu libro-forme aperis en majo 1964. Jam en 1949 estis starigita la „Kantara Komisiono”. Finfine en la jaro 1970, post kelkaj malsukcesoj, eldoniĝis „Adoru Kantante”. Sen preterpasi aliajn personojn, vi povas diri ke Henk multe kontribuis al tiu grandega laboro. Ne estas direble kiom da tempo forrabis tion de la verkintoj. En la listo de aŭtoroj kaj tradukintoj troviĝas lia nomo kun serio da numeroj. Multan atenton tiris liaj lingvaj artikoloj pri la korelativoj, el kiuj rezultis la libro „Du Malsanoj en Esperanto”. Liaj prelegoj en internaciaj kongresoj de KELI, artikoloj kaj recenzoj en *Dia Regno* kaj aliloke ne estas kalkuleblaj kaj ili tamen atestas pri liaj grandaj kapabloj (Adolf BURKHARDT). Ni povas ekkoni la stilon de Henk legante *Nia Historio*-n. Kvazaŭ ni aŭdas lian voĉon. La libro estas ankoraŭ bone legindaj kaj estas ankoraŭ ĝis nun vendataj.

MONDMILITO

Nia Historio, ĉap. 21, temas pri ‘kristalnokto’ en Amsterdam la 9-an de februaro 1941 kaj ties sekvoj. Unu de tiuj sekvoj estis ke je la 20-a de marto 1941 Henk estis arestita kun kelkaj aliaj personoj. La germanoj konfiskadis ĉion de la Haga klubo: arĥivojn, librojn, skribmaŝinon ktp. Henk havante tiam tri malgrandajn infanojn, estis ellasita post nur kelkaj horoj. Tamen la E-klubo daŭrigis sian laboron sub gvido de Henk.

Dum la lasta militvintro 1944/1945 la situacio estis mizerega. Loĝante en Amsterdam multaj homoj malsatis pro striko de fervojistoj kaj blokado de la Aliancaj. En tiu malluma periodo venis lumo. La Sveda Ruĝa Kruco sendis kelkajn ŝipojn kun faruno kaj margarino (*Nia Historio* ĉap. 22). Al tiu Svedujo iris post la 5-a de majo 1945 la unuaj dankleteroj de nederlandanaj KELI-anoj, kiuj hontigis la svedajn gefratojn. Tiele komenciĝis la kontaktoj inter la svedoj Anna ALAMO, Erik CARLÉN k.a.

POST LA MILITO

Multe da laboro estis farenda. La kernestrararo de KUNE, kies prezidanto estis Henk, helpe de Dirk DE BOER, J.D. BRAKEL, C.P. BRAKKÉ kaj Roel VAN SPRONSEN laboregis. Henk ne havis facilan taskon, precipe pro sia lingvistika interesiĝo, kiu spronis lin al multaj verkadoj de lingvistikaj artikoloj, recenzoj, kritikoj, redaktaj laboroj. Reorganizado de la oficejo „Esperanto ĉe la Instruado” kaj de la Nederlanda Ekzamena Komitato, gvidado de debatoj pri ĉefaj taskoj de Kristana Esperantisto, pri rilatoj al UEA ktp. En 1946 oni elektis deligitaron el internaciaj unuiĝoj por transdoni dankon al la Sveda popolo pro la blanka pano en la malsatvintro. Inter la delegitoj ankaŭ estis Henk pro la prezidanteco de KUNE. Siavice Erik CARLÉN invitis Henk por doni E-kurson en Tostarp por pastoroj de Svenska Missions Förbundet (Sveda Misia Federacio). En la adiaŭa vespero Axel ANDERSSON, kiu multe aranĝis por tiu restaĵo, petis al Henk, ke KELI aranĝu someran konferencon en Tostarp. Tiun peton Anna ALAMO kaj Henk spontanee akceptis. La konferenco en Tostarp efektive nomiĝas la unua KELI-kongreso en longa vico da kongresoj. Ĉi tiun jaron okazos la 50-a KELI-kongreso... En 1955 Henk postsekvis Erik CARLÉN kiel KELI-prezidanto, ĝis kiam en 1961 Adolf BURKHARDT transprenis tiun postenon. Persone mi rememoras lin instruante esperantaĵojn dum la Ekumena Kongreso en Dalfsen (1981). Temis pri la verbo fumi: la kamentubo fumas, la viro fumas cigaron, kaj eĉ en Scheveningen oni fumas haringon.

UEA

Lia lingvosocio estis fame konata. En 1963 la Akademio de Esperanto nomumis lin Akademiano, dum li ekde 1972 anstataŭis la direktoron D.B. GREGOR de la Sekcio pri Gramatiko. En tiu tempo li multe studis kaj verkis por la Akademio. Li estis

(☞ 5)

Aŭreljo Aŭgustino (354-430) el *Konfeso*j, libro I I

en traduko de Gerrit BERVELING

kion faris Dio antaŭ la kreo

14 Jen, mi respondas al la demando: ‘Kion faris Dio antaŭ ol li kreis ĉielon kaj teron?’ Sed mi ne respondas, kion laŭdire

(☞ 4)

la nura akademiano kiu verkis jarraportojn pri lingvoproblemoj. Bedaŭrinde tiu laboro subite finiĝis en 1986 sen veraj motivoj flanke de UEA. Post tiom da jaroj tiu afero restas neimagebla!

En multaj UEA-kongresoj Henk partoprenis, ekz. London (1938), Malmö (1948), Haarlem (1954) kaj multaj aliaj.

FINE

En 1993 la fidela edzino Maria mortis post longdaŭra malsaneco. Tiu tempo estis ege peniga por Henk. Li tute ne povis forlasi la domon sen gardado por sia edzino.

Henk apartenas por mi al la antaŭa generacio, kiu fortege laboris. Nun oni disponas pri komputiloj, pri ĉiaj komunikiloj kaj pri komfortaj trajnoj, aviadiloj, aŭtomobiloj. Tiam oni skribis nur per skribmaŝino, sendis leterojn poŝte, nur kelkaj posedis aŭtomobilon. Kiel estos la estonteco por KELI, pri kiu li tiel multe laboris? Multaj amikoj forpasis, la eklezioj malpleniĝis, junuloj ne anstataŭas, tamen la vorto de Willem KRIKKE, lia kolego, estas vera: Esperanto donis al mi grandan plezuron, ĝi plivastigis mian mondon.

Henk ree povas legi kaj studi. Ni deziras al li bonan datrevenon inter lia granda familia rondo.

Leen HORDIJK

foje iu respondis, kiu ludeme evitis la pinton de l’ demando: ‘Li preparis la inferon por homoj, kiuj esploras sekretaĵojn’. Kompreni ne similas priridi. Ne tiel mi respondas.

Ĉar prefere mi respondus: ‘Kion mi ne scias, mi ja ne scias’ — ol ion tian, dank’ al kio oni povus priridi la esploranton de sekretaĵoj kaj laŭdi la viron, kiu donis respondon malĝustan.

Sed vin, nia Dio, mi nomas la kreanto de l’ tuta kreo kaj, se ‘ĉielo kaj tero’ signifas la tutan kreon, tiam sentime mi diras: ‘Antaŭ ol Dio kreis ĉielon kaj teron, li faris nenion’. Ĉar se ion li farus, kion li do farus, se ne kreaĵon? Kaj ho, ke mi sciu same certe, kion porutile scii mi ŝatus, kiel mi certe scias, ke nenio estis kreita antaŭ ol estis kreita kio ajn!

antaŭ la komenco de la kreo, tempo ne estis

15 Sed se ies ŝvebanta menso migras tra bildojn de antaŭaj epokoj, mirante kial vi — ĉiopova Dio, ĉiokrea kaj ĉiotena, arkitekto de ĉielo kaj tero — povis dum sennombraj jarcentoj deteni vin de tia laboro, antaŭ ol vi ekfaris ĝin, tiam li vekiĝu kaj rimarku, ke eraron li primiras. Ĉar kiel povus pasi sennombraj jarcentoj, kiujn vi ne faris, ĉar vi ja estas la fondanto kaj kreanto de ĉio! Aŭ kiuj tempoj ekzistus, kiujn vi ne estus farinta? Aŭ kiel ili povus pasi, se neniam ili ekzistus? Se vi do estas kreanto de ĉiuj tempoj kaj se estis iu tempo antaŭ ol vi kreis ĉielon kaj teron, kiel oni diru ke vi estis senfara? Ĉar tiam vi ja faris ĝuste tiun tempon, kaj ne

(☞ 6)

5

povis pasi tempo antaŭ ol la tempon vi faris. Kaj se 'antaŭ ĉielo kaj tero' ne estis iu tempo, kial oni do demandu, kion tiam vi faris? Ĉar ja ne estis tiemo, se mankis tempo.

16 Vi ankaŭ la tempon ne tempe antaŭas: alie vi ne antaŭus ĉiun tempon. Sed per la alteco de via ĉiam ĉeesta eterneco vi antaŭas ĉion pasintan, kaj ĉion estontan vi superas, ĉar tio estas futura kaj, veninte, fariĝos pasea; sed vi ĉiam estas la sama, viaj jaroj ne finiĝos. Viaj jaroj nek pasas nek venas: la niaj ja pasas kaj venas, por ke ĉiuj povu veni. Sed viaj jaroj samtempe, ĉar ili senmovas kaj ili ne pasas por esti pelitaj de venantaj jaroj, ĉar ili ne forpasas: sed niaj jaroj nur estos kompletaj, se ili ne plu estos. Viaj jaroj estas unu tago, kaj via tago ne estas ĉiutage sed hodiaŭ, ĉar via hodiaŭo ne cedas antaŭ morgaŭo; ĝi ankaŭ ne sekvas hieraŭon. Via hodiaŭo estas eterno: tial vi kreis kuneterna tiun, al kiu vi diris: 'Hodiaŭ mi generis vin'. Ĉiujn tempojn vi kreis kaj antaŭ ĉiu tempo estas vi, kaj neniutempe ne estis tempo.

tri distingoj pri tempo

17 Do neniutempe vi faris nenion, ĉar vi mem faris la tempon. Kaj neni tempo estas kuneterna kun vi, ĉar vi restas; sed se ili restas, ili ne estus tempoj. Ĉar kio estas tempo? Kiu facile kaj mallonge klarigus tion? Kiu, eĉ per pensado, sufiĉe komprenus tion por povi vortigi ĝin? Tamen, kion ni mencias parolante, kio estas pli familiara kaj konata? Kaj sendube ni ĝin komprenas kiam ni parolas pri ĝi, kaj ni same komprenas ĝin kiam iun alian ni aŭdas paroli pri ĝi. Do kio estas la tempo? Se neni demandas, mi ĝin scias; se al demandinto mi volas klarigi, mi ĝin ne scias: tamen mi diras plenkonfide, ke mi scias ke, se nenio pasus, ne estus pasinta tempo, kaj se nenio venus, ne estus estonto, kaj se nenio ĉeestus, ne estus nuntempo. Kiamaniere do povas esti tiuj du tempoj, la paseo kaj la futuro, ĉar unuflanke la paseo ne plu estas kaj la futuro ankoraŭ ne estas? Sed se la nuntempo ĉiam ĉe-

estus kaj ne transirus en paseon, ĝi ne plu estus tempo sed eterno. Se do nuntempo fariĝas tempo per tio, ke ĝi transiras en paseon, kiel do ni diru ke ankaŭ ĝi estas, kies eston ja kaŭzas <la fakto> ke ĝi ne plu estus; tiel ke laŭvere ni diru, ke ĝi estas nuntempo, nur ĉar ĝi strebas ne plu esti!

kion signifas 'longa tempo' kaj 'mallonga tempo'?

18 Kaj tamen ni parolas pri longa tempo aŭ mallonga tempo, sed tion ni diras nur pri paseo aŭ futuro. 'Antaŭ cent jaroj' ekzemple ni nomas 'antaŭ longa tempo', kaj same 'post cent jaroj' ni nomas 'post longa tempo', sed 'antaŭ mallonge' estas ekzemple antaŭ dek tagoj, same kiel post dek tagoj 'post mallonge'. Sed kiamaniere povas esti longa aŭ mallonga io, kio ne estas? Ĉar la paseo ja ne plu estas kaj la futuro ankoraŭ ne. Ni do ne devus diri: 'estas longa tempo', sed pri la paseo 'estis longa tempo' kaj pri la futuro: 'estos longa tempo'.

Sinjoro mia, mia lumo, ĉu ne ankaŭ ĉi tie via vero priridos la homon? Ĉar tiu longa tempo pasea: ĉu ĝi estis longa kiam ĝi jam estis pasinta, aŭ ĉu antaŭe, kiam ĝi ankoraŭ estis estanta? Ĝi ja tiam povis esti longa, kiam ankoraŭ estis io kio povus esti longa: sed pasinte ĝi ne plu estis; tial ĝi ne plu povis esti longa, ĉar ĝi entute ne plu estis. Ni do ne diru: 'longa estis la tempo pasinta', ĉar nenion ni plu trovos, kio estis longa, ĉar depost sia paso, ĝi ne plu estas, sed ni diru: 'longa estis tiu tempo estanta', ĉar ĝi estis longa, dum ĝi estis estanta.

Ĉar ĝi ankoraŭ ne pasis por fariĝi nenio, kaj tial estis io kio povis esti longa; sed post kiam ĝi pasis, ĝi samtempe ĉesis esti longa, ĉar ĝi ĉesis esti.

nur parto de la jaro ĉeestas

19 Do ni rigardu, ho homa animo, ĉu la ĉeestanta tempo povas esti longa: ĉar al vi estis donite percepti kaj mezuri tempo-daŭron. Kion vi respondos al mi? Ĉu cent

(87)

ĉeestantaj jaroj estas longa tempo? Sed unue rigardu, ĉu povas ĉeesti cent jaroj. Ĉar dum la paso de l' unua jaro, ĝi mem ja ĉeestas, sed la naŭdek naŭ ankoraŭ estas estontaj, do ne jam estas: kaj se pasas la dua jaro, unu jam estas pasinta, la dua ĉeestas kaj la ceteraj estas estontaj. Kaj se iun ajn el la mezo de tiu centopo ni supozas ĉeestanta, tiam la jaroj antaŭ ĝi jam pasis, kaj tiuj post ĝi nur estas estontaj. Kaj tial ne povas ĉeesti cent jaroj. Sed tiam minimume rigardu, ĉu la pasanta jaro vere ĉeestas. Ĉar ankaŭ el ĝi, dum pasas la unua monato, la ceteraj monatoj estas nur estontaj; kaj dum pasas la dua monato, la unua jam estas pasinta kaj la ceteraj ankoraŭ ne estas. Do ankaŭ la pasanta jaro ne ĉeestas tuta, kaj se ĝi ne tuta ĉeestas, ne la jaro ĉeestas. Ĉar la jaro estas dek du monatoj, kaj kiu ajn monato elinter ili, se ĝi estas pasanta, ĉeestas, sed la ceteraj estas aŭ pasintaj aŭ estontaj. Kvankam — eĉ ne la pasanta monato ĉeestas, sed nur unu tago el ĝi: ĉar se estas la unua tago, tiam la ceteraj ankoraŭ sekvas, sed se estas la lasta, tiam jam pasis la ceteraj; se estas iu tago en la mezo, tiam ĝi kuŝas inter la pasintaj kaj la estontaj.

nuntempo estas tre mallonga

20 Jen do la nuna tempo — la sola tempo kiun ni trovis nomebla 'longa' — estas limigita je apenaŭ la daŭro de unu tago. Sed ankaŭ ĝin ni dividu, ĉar eĉ unu tago ne tuta ĉeestas. Ĝi ja pleniĝas de la dudek kvar horoj de tago kaj nokto, kaj la unua horo havas ĉiujn ceterajn <antaŭ si> kiel estontajn, la lasta <malantaŭ si> kiel pasintajn, kaj iu ajn meza horo havas la pasintajn malantaŭ si kaj la estontajn antaŭ si. Kaj ankaŭ unu horo pasas je rapidantaj eretoj: kio ajn el ĝi forflugis, estas pasinta, kio restas, estonta. Se imageblas iu tempo, kiu ne plu estas dividebla en eĉ la plej etajn erojn, tiam tio estas la sola, kiun eblas nomi nuntempo; sed tiu tiel rapide transiras de estonto en paseon, ke ĝi etendiĝas en neniun eĉ plej eta daŭro. Ĉar se ĝi etendiĝas, ĝi dividiĝas en

paseon kaj futuron: nuntempo tamen ne havas daŭron. Kie do estas la tempo kiun ni nomu longa? Ĉu en la estonto? Tiam ni ne diras: 'ĝi estas longa', ĉar ankoraŭ estas nenio, kio povus esti longa; sed ni diras: 'ĝi estos longa'. Sed kiam do estos? Se ja ankaŭ tiam ĝi ankoraŭ estos estonta, ĝi ne estos longa, ĉar ne jam estos, kio estu longa: sed se tiam ĝi estos longa, kiam el la ankoraŭ ne estanta estonto ĝi jam komencos esti kaj jam estos fariĝinta ĉeesta, tiel ke estos io, kio povus esti longa, tiam la nuntempo jam per la ĵusaj vortoj vokos, ke ĝi ne povas esti longa.

tamen la tempon ni mezuras

21 Kaj tamen, Sinjoro, la tempospacojn ni sentas kaj komparas reciproke kaj kelkajn ni nomas pli longaj, aliajn malpli longaj. Ni ankaŭ mezuras, kiom pli longa aŭ malpli longa estas tiu tempo ol ĉi tiu tempo, kaj ni diras ke ĉi tiu estas duoble aŭ trioble longa kiel tiu, aŭ ke tiu estas same longa kiel tiu ĉi. Sed ni mezuras la pasantajn tempojn, mezurante per perceptado; sed la pasintajn <tempojn>, kiuj ne plu estas, aŭ la estontajn, kiuj ankoraŭ ne estas: kiu povas mezuri ilin? Aŭ iu devus kuraĝi aserti, ke li povas mezuri, kio ne estas. Dum do pasas la tempo, ĝi povas esti perceptata kaj mezurata, sed kiam ĝi pasis, tio ne plu eblas, ĉar ĝi ne plu estas.

kaj tamen estas tri tempoj

22 Mi demandas, Patro: mi ne asertas: mia Dio, konduku min, gvidu min. Kiu kuraĝas aserti al mi, ke ne estas la tri tempoj, kiujn ni ankaŭ lernis kiel infanoj kaj kiujn al la infanoj ni instruis: paseo, nuntempo, kaj futuro — sed ke estas nur nuntempo, ĉar ĉi aliaj du ne estas? Aŭ ĉu ankaŭ ili estas, kaj ĉu la tempo aperas el iu kaŝitaĵo, kiam el estonto ĝi fariĝas nuntempo, kaj reforiras ĝi en kaŝitecon, kiam el nuntempo ĝi fariĝas paseo? Ĉar la homoj kiuj antaŭdiris la es-

(88)

7

LA EKONDUKO DE MONAĤISMO EN LA FRANCA PROTESTANTISMO

1. Protestantismo kaj monaĥismo

La kalvina kaj la lutera reformacio disvolvis ĝian teologion sen la kontribuado de la monaĥa tradicio enradikigita en kristianismo ekde la dua jarcento, ĉar Lutero kiu estis aŭgustena monaĥo, akrege kritikis la monaĥajn votojn en 1521. Fakte, protestantismo sorbis la trajtojn kaj la kernon (esencon) de la monaĥa spiritualeco kunportante ĝiajn postuladojn kaj ĝian rigorecon al unu privilegia renkonto kun ĉiuj solaj estuloj antaŭ Dio sen la perado de sanktuloj, per la Sola Fido, la Graco kaj la Skribo.

(☞ 7)

tontajn tempojn, kie ili vidis ilin, se ili ankoraŭ ne estas? Ĉar kio ne estas, ne povas esti vidata. Kaj kiuj rakontas la pasintecon, neniel rakontus la veron, se ili ne vidus tion anime: sed se tio ne plu estas, ĝi neniel povus esti perceptata. Do estas kaj la estonto kaj la paseo.

kiel estas paseo kaj futuro

23 Sinjoro, mia espero, lasu min plu-demandi; mia atento ne konfuziĝu. Ĉar se estas kaj estonto kaj paseo, mi volas scii, kie ili estas. Kaj kvankam tion mi ankoraŭ ne povas scii, mi tamen jam certas, ke kie ajn ili estu, tie ili ne estas estontaj aŭ pasintaj, sed ĉeestaj. Ĉar se ankaŭ tie ili estas estontaj, ili ankoraŭ ne estas tie, kaj se tie ili estas pasintaj, ili tie ne plu estas. Do kie ajn ili estu: kio ajn estas, ne estas se ne ĉe-esta. Kvankam — kiam la paseon laŭvere oni rakontas, tiam el la me-

Tiel, historie en la protestantaj landoj kiel Germanio (sen Bavario), Skandinavio, ktp, la monaĥoj estis elpelitaj aŭ fariĝis aliancanoj kaj kelkfoje aktivaj aktoroj de la Reformacio. En Francio, venkis la komplekseco de la politika ludo kiam protestantismo fariĝis politika kaj religia potenco kiu povas minaci la reĝan absolutismon, do la ekvilibron inter la politikaj kaj la religiaj potencoj. Estis Henriko la 4-a (1553-1610), la herezulo kaj la refalintulo kiu malkonfesis, sed malgraŭ tio, kiu subskribis la Edikton (☞ 9)

moro oni ekprenas ne la aferojn mem, kiuj pasis, sed vortojn konceptitajn laŭ la bildoj de tiuj aferoj, kiuj dank' al la sensumoj en la animo preterpasante postlasis kvazaŭ siajn spurojn. Ekzemple mia junaĝo, kiu ne plu estas, estas en la paseo, kiu ne plu estas; sed kiam ĝian bildon mi revokas kaj rakontas, en la nuntempo mi ĝin vidas, ĉar ĝi ankoraŭ estas en mia memoro. Ĉu estas simila kialo por la antaŭdiro de l' estonto, tiel ke jam antaŭperceptiĝas estantaj bildoj pri aferoj, kiuj ankoraŭ ne estas — mi konfesus, mia Dio: tion mi ne scias. Sed tion ĉi mi ja scias, ke pri niaj estontaj agoj ni ofte antaŭpensas kaj ke tiam tiu antaŭpensado ĉeestas, sed la ago mem, pri kiu ni antaŭpensas, ankoraŭ ne estas, ĉar ĝi <tiam> estas estonta; kaj kiam ni komencis plenumi ĝin, kaj ekagis kion ni antaŭpripensis, ja tiam estos tiu ago, ĉar tiam ĝi ne estos estonta, sed ĉeesta.

de Nantes en 1598. Tio certigis religian pacon en Francio sub la reĝa kontrolo konsentante al reformitoj, la liberecon de konscienco kaj kulto, plie la atingeblo al ĉiuj reĝaj oficoj. Tiu relativa paco ne daŭris pro la fortaj politikaj premoj; tiel, la konsekvencoj estis tre gravaj: kelkaj katolikaj aristokratoj enkondukis kaj postulis limigojn al la Edikto de Nantes ekde 1661. Poste, Ludoviko la 14-a (1638-1715) subskribis en 1685 la nuligon de la Edikto. La Reĝo ne povus konjekti ke pli ol 200 000 protestantaj francoj ekziliĝos al aliaj landoj (Germanio, Nederlando, Usono, Sud-Ameriko, ktp). Parte, tiuj ĉi revenis dum la franca Revolucio en 1789 kaj 1804.

La franca protestantismo fariĝis unu religio en ekzilo, kio devigis ĉiujn kredantojn kiuj restadis en Francio, vivi sian religion kun ia „malgraŭvola diskreteco” kun konstanta subpremo dum pli ol unu jarcento. Tial, oni povas kompreni, pro tio, ke la politikaj kaj doktrinaj kontraŭstaroj inter protestantoj kaj katolikoj estis speciale akraj ĝis la komenco de tiu jarcento. Tiel, pro tiu malofta kaj tragedia historio, la enkonduko de la komunumo de la diakoninoj de Reuilly (*röji*, apud Parizo) en la 19-a jarcento, estis malfacilega en la reformitaj rondoj en Francio: ĉiuj „romanaĵ” spuroj estis akrege batalitaj. Necesas precizigi ke dumtempe en la protestanta Germanio, monaĥismo en sia konata formo dum jarcentoj (krom la eta komunumo de la germano Gerhard TERSTEEGHEN (1697-1769) kaj la Moravaj Fratoj), ankoraŭ ne ekzistis.

Post la dua mondmilito, elrompiĝis la doktrinaj ligiloj kaj disvolviĝis novaj teologioj malgraŭ ke parto de protestantaj eklezioj en Germanio kompromitiĝis kun la nazia reĝimo. Tiel, la doktrina rektanimeco estis forte ŝanceliĝanta. La protestanta teologo Karl BARTH (1886-1968) korpigis kun Dietrich BONHOEFFER (1906-1945) tiun renovigon kiu ludis gravan rolon kontraŭ la nazia reĝimo (La deklaro de Barmen). Barth disvolvis teologion nomitan „dialektikan” kiu

reiris al la Biblio kaj evidente al la Parolo de Kristo.

El la ruinigoj de tiu milito, ekaperis la urĝon profunde ŝanĝi kaj dialogi inter ĉiuj kristanoj. La protestantoj Roger SCHUTZ kun Taizé (*teze*) kaj Antoinette BUTTE kun Pomeyrol (*pomerol*) provis realigi tiun utopion de paco kaj konkordo, religiĝante kun cenobita monaĥismo kiu estis, laŭ kelkaj aŭtoroj, pli ekumena en Taizé ol en Pomeyrol. Tiu influo estis gravega ĉar la komunumo de Reuilly reiris al siaj ginaroj, laŭ la tezo de la fratino M. M. HAN-DY, malkovrante ke iliaj fondintoj, en tiu 19-a polemika jarcento, estis devigitaj ne preni la monaĥan vojon. Pliposte, kelkaj fratinoj fondis, antaŭ dekdu jaroj (1988), la komunumon de Valleraugue (*val'rog'*, Gard, Francio) kiu teorie kaj praktike malfermis novajn paŝojn kiujn ni malkovras kaj priskribas sube.

2. La nova komunumo de Valleraugue

En 1988, kvar fratinoj de Pomeyrol forlasis la komunumon. Poste, ili petis la Reformitan Eklezion de Francio (E.R.F.) trovi lokon kiun tiu eta komunumo bezonus. La respondo venis kaj la E.R.F. petis ilin ekloĝi en Valleraugue. En 1992, la fratinoj kun du teologoj redaktis la lastan version de la Regulo kiun parte ni prezentas ĉi-tie:

Sendube, la fratinoj de Valleraugue estis profunde markitaj de la cirkonstancoj kiuj devigis ilin forlasi Pomeyrol-on por poste fondi alian komunumon. La Regulo, en sia versio de 1992, estas tre klara kiam ĝi difinas la obeon: oni devas kompreni ĝin komence de la nocio de konscienca libereco kaj de la respondecoj kiujn ĝi postulas; ili aldonas artikolon, en tiu Regulo, pri konscienca libereco. En tiu komunumo, la „respondeca fratino” estas elektita por tri jaroj kaj prezidas la konsilion de la fratinoj sed ŝi ne prezidas la pastoran konsilion de la komunumo formitan de la akompanantoj kiuj estos konsilantaj por gravaj decidoj; (☞ 10)

KOMUNA DEKLARO PRI LA DOKTRINO DE PRAVIGO

La kongresanoj de Nantes en 1998 havis je dispono la Esperanto-version de la dokumento, kiun oni nun solene subskribis je la Reformacia Tago, la 31a de oktobro 1999, en Augsburg. Pli ol 30 jarojn la teologoj komisie de Vatikano kaj Luterana Mondfederacio estis luktintaj por alproksimiĝo en unu centra punkto de la kristana kredo.

La Ekumena Diservo en Stuttgart en la historia preĝejo St. Leonhard, kiu okazis je

(☞ 9)

ĉiam, ĉiuj gravaj decidoj estos prenataj de la nura komunumo, do de la fratinoj. La ofico de la respondeca fratino „estas antaŭ ĉio de pastora vigleco”. Do ŝi devas ekvilibri kaj protekti la pacon kaj la liberan cirkuladon de la parolo ene de la komunumo.

La regulo precizigas ke la fratinoj preferas la monaĥan dimension, aŭ la eremetismon, (solan kaj unuecan) kiun asertas la libereco de ĉiuj antaŭ Dio ol la cenobitismo kiu pli insistas pri la komuna vivo. Tiel, la disponebleco, do la „kunvoko”, estas konstante en la kerno de la monaĥa vivo.

La malriĉeco estas promeso por „la divido de ĉiuj materialaj kaj spiritaj posedaĵoj kiuj estas ricevitaj komunume”, kaj la komunumo ne postulas formale ke unu fratino dividu siajn proprajn posedaĵojn; la libereco devas esti en la kerno de la divido. La unua paragrafo de la Regulo tuŝas la temon de fraŭleco. La protestanta teologo proponas solvon al ĉi tiu grava demando: fraŭleco ne estas „supra ordono” kaj oni akcentas kiel vere ke la geedza vivo tute riĉigas vivon de fideleco kaj debaton pri servo. Intere estas konstati ke tiu eksplicitega pozicio indikas debaton kiu estas apogata kaj instigata de multaj protestantaj teologoj. La komunumo de Valleraugue aldonas novan dimension kiun ni citas: „El tiu

la 20-a de novembro, sabate antaŭ la lasta dimanĉo de la liturgia jaro 1998/99, staris sub la impreso de Augsburg. Gvidis pastoro Albrecht KRONENBERGER. Predikis pastoro Adolf BURKHARDT. Surprize partoprenis gasto el Nederlando, Simon SMITS, sekretario de la nederlanda IKUE-sekcio.

En la gazetaro, la evento de Augsburg rapide ree malaperis en la fonon. Tie, en histo-

(☞ 11)

vidpunkto, kvankam fraŭleco restas la kutima formo de komunuma vivo, ni preferas ne fari promeson pri ĝi. Se paro prezentigas aŭ se unu fratino esprimas la deziron edziniĝi, ni volas serĉi kun niaj akompanantoj, rimedojn por krei aŭ konservi la komunuman ligon sub specifaj formoj por ĉiu situacio”.

3. Konkludo

La sinteno de la Komunumo de Valleraugue rilate la problemon de la obeo kaj la klaŭzo, en ĝia regulo, de konsciencia libereco, indikas al ni notindan ŝanĝon en la percepto de la franca protestantismo pri „la monaĥa vojo”. Ĉu ni povos proponi la hipotezon ke en la reformitaj eklezioj estis, ekde kelkaj jardekoj, grava disvolviĝo pri asimilado de la monaĥa tradicio? La 19-a kaj la 20-a jarcentoj ebligas pro ekumenismo, nun enradikiĝinta, la rekomenciĝon, post Lutero kaj Kalvino, de la pripensoj ĉirkaŭ tiu kontesta demando de la monaĥaj votoj. Dum kaj post tiuj diskutoj, oni vidis la fondiĝon de multaj grupoj religie inspirataj kaj de kelkaj „monaĥaj” komunumoj kiel Taizé, Pomeyrol kaj nun Valleraugue.

Michel CLÉMENT

30570 Villeméjane-Valleraugue, Francio
rete: <mclement@francemultimedia.fr>

ria loko kaj signifa dato, la Reformacia Tago, solene estis subskribita la Komuna Deklaro pri la Doktrino de Pravigo. Post Diservo en la katedralo, procesio de altrangaj reprezentantoj de Vatikano kaj Luterana Mondfederacio, moviĝis al la preĝejo St. Annen. Tie oni metis jure validajn subskribojn al dokumento, kiu unuafoje post la Reformacio konstatas vastan akordiĝon de ambaŭ eklezioj pri demando, kiu siatempe esence kontribuis al la dispartigo de la eklezioj.

Kiel la homo praviĝas antaŭ Dio? La kutimaj respondoj draste diferencis. Laŭdire unuj diris: „se oni sincere klopodas kaj faras bonajn agojn, tiam Dio aprobas”; la aliaj: „nur per la fida kredo, sen propra kontribuo”. Post intensa pritrakto de la temo, la teologiaj komisionoj venis al la konkludo, kiu nun estas oficiala: la kondamnoj kaj reciprokaj anatemoj eldiritaj antaŭ pli ol 450 jaroj ne trafas la instruon de la hodiaŭa eklezio. Laŭvorte ni legas: “Komune ni konfesas: “Sole per graco en la kredo je la sava faro de Kristo, ne surbaze de nia merito, ni estas akceptataj de Dio kaj ricevas la Sanktan Spiriton, kiu renovigas niajn korojn kaj kapabligas kaj vokas nin al bonaj faroj”.

Kiel kristanaj esperantistoj ni sekvis la dialogojn kun plej alta atento. Somere de 1998, ĉe la 13a Ekumena Kongreso en Nantes, iuj kongresanoj havis en la mano Esperanto-version de la Komuna Deklaro pri la Doktrino de Pravigo, kaj tiun dokumenton ili tralaboris dum tuta semajno en longaj sesioj. Kiam alvenis la informo, ke Vatikano formulis nombron da rezervoj kaj ke verŝajne la solena subskribo tute ne okazos, itala partoprenanto prenis el sia poŝo aktualan eldonon de *Osservatore Romano* kaj voĉe tradukis la koncernajn partojn.

Unu jaron poste, somere de 1999, okaze de la 14a Ekumena Kongreso en Gliwice, Pollando, la kongresanoj el 20 landoj kaj multaj eklezioj havis alian dokumenton antaŭ si: Malgranda Ekumena Katekismo, de Heinz SCHÜTTE, katolika teologo en Paderborn. Kio estas komuna al ĉiuj kristanoj?

Kio (ankoraŭ) disigas ilin? Eĉ fakuloj miris pri la amplekso de komunaj eldiroj pri bazaj elementoj de la kristana kredo kaj ties transformo en la praktikan vivon.

Poste venis informo, ke suplementa dokumento klarigis kaj pliprecizigis la punktojn elnombritajn en la Vatikana respondo. Inter la malmultaj membroj de la komisiono, kiu tiamaniere liberigis la vojon al interkonsento, troviĝis la iama luterana episkopo de Bavario, HANSELMANN (li intertempe jam mortis,) kaj — profesoro Heinz SCHÜTTE!

Episkopo Karl LEHMANN, prezidanto de la germana episkopa konferenco, nomis la dokumenton subskribitan en Augsburg ĉeko provizore ne kovrata. Kiu devas zorgi pri la kovro de la ĉeko? Certe ne nur kelkaj oficialuloj. Almenaŭ ni intencas daŭrigi la temon kaj ne permesi ke ĝi malaperu en tirkeston. Ni volas montriĝi dankemaj homoj kiuj ĝojas pri tiu donaco. Kiom da jaroj ni preĝis pri paŝoj en tiu direkto. Ĉu ni kredas ke Dio aŭskultas preĝojn, aŭ ĉu ni preferas ĉion ree kovri sub niaj kontraŭ-argumentoj?

Nin Esperanto-amikojn tio ĝojigas, ke trans ĉiaj lingvo-limoj ni povis komune legi kaj studi la dokumentojn en la neŭtrala lingvo, kiu neniun privilegias kaj neniun diskriminacias. En mia Esperanto-fako mi eĉ pli rapide retrovas la gravajn tekstojn ol inter la amaso de mia germana teologia literaturo — la Aŭgsburga Konfeso de 1530, la Fina Dokumento de Bazelo 1989, la Komuna Deklaro, la Ekumena Katekismo de Heinz SCHÜTTE. Volonte ni memoras ankaŭ, ke okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Augsburg, 1985, la Evangelia Diservo okazis ĝuste en la preĝejo de la nuna subskribo. Ĝi estis dulingva, germana kaj Esperanta, komune por la loka paroĥo kaj la kongreso, kun prediko de la KELI-prezidanto kaj internacia kunlaboro.

Unu paŝo estis farita en Augsburg 1999. Aliaj devas sekvi. La ĉeko estu pagita.

Adolf BURKHARDT

Ekumenismo de kvakera vidpunkto

Martin HOWARD

Kvakerismo datiĝas de la 17a jarcento en Anglio. La celo same kiel la fonoj de preskaŭ ĉiu movado de kristana reformado, estis reveno al la fontesenco de la instruo de Jesuo.

Ni nun atendas la rezultojn de la pli ol centjara enketo de la „Jesua Seminario”, de mondvesta teologiario, por eltrovi la originajn, plej probablajn, vortojn de Jesuo, la tiel nomata Q Evangelio, de kio la 4 evangelistoj elĉerpis citaĵojn.

(Vi nun povas legi angle la rezulton en la libro „*Honest to Jesus*” de Robert W. FUNK, kiu prelegadas de la 25-a marto ĝis la 2-a majo tra Britio.)

Kvakeroj havas du tendencojn.

Unue: universalan, agnoskante la belan plurecon de la vojoj al nia propra dio. Pro tio, kelkaj kvakeroj ankaŭ apartenas al aliaj religioj, eĉ ekster la kristana religiaro.

La dua tendenco estas pli evangelika, kaj insistas pri la unuarangeco de Jesuo kaj la aŭtoritato de la Biblio. Ambaŭ tendencoj kunekzistas, eĉ ene de la sama loka grupo. Estas ĉielarko da vidpunktoj inter la du. En Usono 3 grandaj grupoj aperis sed nun tie estas penoj al ekumenismo inter la tri, kaj ĝi iomete sukcesas.

Oni ofte diras ke kvakeroj nur havas unu kredon — „**Ke ni ne havu kredojn**”. Pravo.

Sed ĉio en la kvakera vivo devenas de la ideo ke estas „**io de la dio en ĉiu**”. Kelkaj diras ke estas io dieca en ĉio: bestoj, plantoj kaj elementoj kaj mineraloj. Kiel potisto, kiam mi potas mi pensas pri la dieco en la argilo, kaj poste en la pota.

Do, malamo ne eblas: detruo de la medio, bestoj, arbaroj estas ne ebla.

Paco estas la ĉefa celo, kaj verda paco al nia medio, la kreo de dio.

Pro tio ni helpas la vundintojn de

ĉiu flanko de militoj. Ni agis tiele en kara Pollando post la 2-a mondmilito kaj simile agas en la Balkanaj ŝtatoj. Tio estas ekumenismo laboranta.

De la lastaj jaroj de la 19-a jarcento, kreskis la ideo pri ekumenismo, speciale post konferencoj en Manĉestro, 1895, kaj Edinburgo en 1910. La kristanaro en Britio celis ian unuecon, kiu superos doktrinojn kredojn ombrele. **Ili ne celis unuigon de la eklezioj.**

La rezulto por ni estis ke kvakeroj en Britio estu „**observantoj, rigardantoj**” de la kristanaj eklezioj. Ni agis kune kiam eblis sed restis apartaj kiam ni ne povis subteni la celon de la aliaj. Tio bone funkciis dum dekoj da jaroj.

Sed, en la 80-aj jaroj la aliaj eklezioj allogis kaj kaptis la grandan fiŝon, la romkatolikan! Sed la fiŝo havis vermon por ni en la kontrakto. Ili postulis ke ne plu daŭru la membra klaso „**observantoj, rigardantoj**”. Ĉiu estu membro aŭ nenio.

Tion pritraktis du kvakeraj jarkunvenoj; en 1990 en Aberdeen, Skotlando; kaj poste en 1997 en Aberystwyth (Kimrio). Kiom da vi povas prononci „Aberystwyth”? Ambaŭ kunvenoj estis ege akraj je kvakeraj kutimoj ĉar temis nian kredon ke „**Ni ne havu kredojn**”. Post la unua, iu subaŭskultis ĉefon diri „Ni sukcesis plenumi ĝin” (en la angla lingvo, „*We pulled it off*”). Ve!

Post ambaŭ decidoj en 1990 kaj 1997, la evangelikaro ĝojis, festis kaj eĉ dancis en la kunvenejo! Ŝoko por ni aliaj.

Mi preskaŭ min mortigis dum la 97-a jarkunveno pro tia decido kaj mi neniam forgesos tiun tagon.

Sed la evangelika tendenco venkis, aŭ gajnis almenaŭ la 2 komencajn batalojn de milito, se mi rajtas uzi ne kvakerajn vortojn.

Nun estas subskribita kontrakto ke kva-

keroj en Britio estas „kristanaj”. Do, pro tio, mia agado pri ekskomunistoj en Pollando devis ĉesi ĉar mi ne plu povis diri „ne necesas esti kristana por esti kvakero”. Kvakeroj en aliaj religioj devos elekti unu aŭ la alian! Ve!

La kontrakto havis 3 paragrafojn kaj multajn ne difinitajn vortojn. Tiuj paragrafoj speciale pritraktas la senkredecon de la kvakeroj kaj promesas ke ni povos resti tia. Ni kune akceptis, sed ne tutkore aŭ unuece, *la sentojn malantaŭ la vortoj*. Tio, laŭ mi kaj aliaj, estis eraro ĉar la kontrakton oni eble povos devigi kaj tiam uzi la difinojn de la skribintoj de la kontrakto kaj ne la difinojn de la akceptintoj de la kontrakto. Tikla jura afero!

Nun, en mia mano estas la provo ke estas kaj estis kampanjo por ŝanĝi kvakerismon al kredarhavanta religio. (Heinz SCHUTTE, *Malgranda Ekumena Katekismo*, „...ke iuj estu unu...” stato de ekumeno sojle de la 3a jarmilo; Villingen 1999 eldonita nome de Ekumena Komisiono de IKUE [Internacia Katolika Unuigo Esperantista] kaj KELI [Kristana Esperantista Ligo Internacia]).

Mi intencas traduki ĝin anglan, se neniu tion ĝis nun faris, kaj disvastigi ĝin rete kaj papere al ĉiu kvakero en Britio kaj aliloke. Kiam ili legas viajn proponojn okazos skandalo. La trompo estas malkaŝita. La planon ni eltrovis. Kvakeroj militos! Sed Amike kaj eĉ pace!

Pasintjare Eldonejo HEJME inaŭguris la eldonadon de broŝurita verkoj pere de „Ŝlosiloj por pli profunda vivo” de A.W.Tozer, fama usona predikisto (1897-1963). La libreto (ISBN 83-907637-1-0; p. 36), en sia simpla formo (sed abunda enhavo) estas la ekzemplo, ke literaturo en Esperanto povas progresi ankaŭ per malgrandaj formoj kaj monrimedoj.

Eldonejo preparas la aliajn eldonaĵojn kaj aldone proponas al ĉiu leganto de *Dia Regno* la preponon kaj la eldonon de ties propra verko, poezio, traduko ktp. en tre favoraj prezoj.

Informiĝu ĉe:

Eldonejo HEJME, PL 41-250 Czeladź, poŝtfolio 59; rete: kleja@post.pl

Mallonga meditado por Pasko pri Johano 3:16

Jesuo diris:

Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidus al li, ne pereu, sed havu eternan vivon.

Johano 3:16

Johano 3:16 estas verŝajne unu el la plej ofte citataj versikloj el la Nova Testamento, eble pro tio, ke ĝi donas tiel belan sed mallongan resumon pri la esenco de la kristana fido. Tamen estas facile preteratenti la plenan signifon de tiu konciza eldiraĵo de nia Sinjoro. Dio ne nur amas la „mondon” kiel tuto, li ankaŭ amas min, kaj vin, kaj ĉiujn homojn sur la tero, kaj donis sian Filon por ĉiu aparta persono. Kaj ĉu eblas kapti la veran signifon de „donis Sian Filon?”

Ĉu vi povas imagi, ke vi donus (ĝismorte) **vian** filon aŭ **vian** filinon por savi aliajn homojn, eĉ tiujn, kiuj ne aparte meritas tion? Pensante pri tio, ni akiras almenaŭ iometan ideon pri tio, kiel grandega estas la amo de Dio por la homaro. Sed spite al tio, multaj homoj ankoraŭ asertas, ke Dio estas indiferenta vide al la homa suferado. Ĉu povas esti pli granda diabla mensogo, ol tiu? La kruco mem refutas ĝin.

Jerald VEIT

jveit@execpc.com

(unue aperis en la elektronika novaĵletero „365 Tagoj el la Biblio”, 22 feb 2000, <www.execpc.com/~jveit/>)

ĈU IO BONA POVAS VENI EL RAŬMA?

Kial oni ne volas kompreni raŭmismon?

Plurloke kaj plurfoje mi legas atakojn kontraŭ raŭmismo, kvazaŭ ĝi estus la malamiko de la „veraj” esperantistoj. Ĉar mi konsideras min vera esperantisto — kvankam ĝuste pro la esperantistoj jam plurfoje mi intencis ĉiujn sendi diablen kaj kabei — mi volas provi, ankoraŭfoje pledi por tiu, kiu laŭ mi estas la sola ebleco konservi ne nur sian esperantistecon, sed verŝajne esperanton mem.

Laŭ la manifesto de Raŭmo (TEJO-Kongreso en la finna urbo Rauma en 1980) supozeble ĝis la venontaj 20 jaroj (nome ĝis la jaro 2000) ne okazos la fina venko, do preferi ni utiligu esperanton ne kiel duan lingvon por ĉiuj, sed kiel unuan lingvon por tiuj, kiuj volas ĝin elekti kiel vehiklo de unika kulturo kaj identeco.

Tiu estas, se ne la kompleta enhavo de la manifesto, almenaŭ simpla klarigo kaj, certe, mia sinteno tiurilate.

Fakte, kvankam jam esperantisto ekde mia juneco, mi preskaŭ forgesis ĝin kaj tute ne okupiĝis pri ĝi dum jardekoj. Nur en la 80-aj jaroj, malkovrinte tiun novan difinon de esperanto, kiun tamen mi daŭre ŝatis, mi reaktiviĝis.

Dank’ al esperanto mi ricevis multon: kulturo, socie, persone. Finfine ankaŭ por trovi en ĝi kulturalan identecon.

Tio sufiĉis al mi por lerni ĝin bone, profunde, por vivi ĝin laŭ la eblecoj de mia profesio; eĉ utiligi ĝin por profesia kresko.

Neniam mi klopodis konvinki tiujn, kiuj ne volis esti konvinkitaj; male, neniu sukcesis moki, kompati aŭ ridindigi min. Kaj tio sufiĉas. Toleremo estas, oni diras, la unua regulo de esperantismo. Bedaŭrinde oni nur diras ĉar se esperantistoj estas tolere-
maj al ne esperantistoj, certe ili ne es-

tas tiaj al samideanoj!

Kiamaniere raŭmistoj propagandas do esperanton, aŭ prefere, kiamaniere ili laboras por ke esperanto estu agnoskata kiel valora lingvo?

Ĝuste en la dua demando enestas mem la respondo.

Tion povas pli bone ol aliaj kompreni protestantoj, ĉefe francoj. Kiamaniere francaj protestantoj sukcesis akceptigi sian religion en tempoj, kiam ili estis persekutataj? Certe ne per konvinkado, sed simple kiel bona ekzemplo al aliaj: kiom da seriozaj kaj estimataj kuracistoj, advokatoj, notarioj, intelektuloj siatempe en Francio estis protestantoj? Se protestantoj estis nur eta minoritato en Francio, en la franca intelektularo ili ne estis tiom eta minoritato: ni povas aserti, ke 5% de protestantoj okupis 80% de la ĉefaj postenoj [ndlr: kiel franca protestanto, mi miras pri tiuj ciferoj, kaj petas pri klarigoj]. Jen la solvo: labori de interne ne por, sed per.

Jen la interna ideo de raŭmismo. Sed verŝajne tio timigas la malkuraĝulojn, timigas la vanulojn, kiuj preferas blabla-i anstataŭ fariĝi elstaraj en sia profesio, malgraŭ ilia esperantisteco.

Marco PICASSO
05.03.2000

Mi informas vin ke aperis la marta numero (n-ro 92) de Juna Amiko. La redakcio rekomendas la varian enhavon por ĉiuj Interkulturaj klasoj. Vi trovas plurajn mallongajn verketojn, ĉarman versaĵeton de Ludmila JEVSEJEVA, kanteton de Mike SÄDLER, ŝercojn el Finnlando, leterojn kaj desegnaĵojn de IK-klaso el Bixad, Rumanio, alvokon al fabelkonkurso internacia kaj multajn aliajn, inter ili plurajn kvizojn, unu el kiuj, la tradicia, nun komencas sian 11-an jaron. Provu konkursigi viajn lernantojn.

reta listo de Esperanto-instruado

UEA-Komisiono por la Arablingva Mondo

OFICIALA ANTAŬKONGRESO EN AMANO, JORDANUJO

Sub la alta aŭspicio de lia moŝto prof. Faisal O. AL-REFOU’H, Ministro pri Kulturo de Jordanujo, dum la monato julio de la jaro 2000-a, de la 22-a ĝis la 25-a, okazos antaŭkongreso en Jordanujo.

La antaŭkongreso konsistas el tri sendependaj sed kunligitaj eroj:

– Tradicia antaŭkongreso (vidu la vojan planon en la postaj paĝoj);

– Renkontiĝo por arabaj esperantistoj en Amano, al kiu aliĝos la antaŭkongresanoj;

– Seminario en la israela vilaĝo nomata „Pac-oazo”, kiu konsistas el miksitaj, juda-araba loĝantaro kaj specialiĝas pri problemoj

de paco kaj kunvivado en la Meza Oriento.

De tie oni komune veturos al la Universala Kongreso.

Seminario en Amano 22-24.07

Okazos en Amano seminario „*Tutmondigo kaj la arabaj landoj*”, al kiu estas aparte invitataj la esperantistoj el ĉiuj arabaj landoj.

Dum la 22-23.07 ĝi okazos en la Reĝa Kultur-Centro kaj en la mateno de la 24.07 en la hotelo Le Meridien.

Prelegos Humphrey TONKIN kaj Faisal AL-REFOU’H kaj pluraj aliaj konataj esperantistoj.

Partoprenantoj de la seminario restos en Amano dum la 22-a kaj 23-a de julio. Al ili aliĝos la antaŭkongresanoj dum la mateno de la 25-a de julio.

o o o

Arabaj esperantistoj estas varme invitataj partopreni. Temas pri la unua oficiala kunveno de arabaj esperantistoj en la lastaj jardekoj.

Se vi deziras aliĝi al unu el la tri eroj kaj ricevi la definitivajn detalojn, bonvolu kontakti la Araban Komisionon, ĉe:

Renato CORSETTI, Colle Rasto, IT-00036
Palestrina, Italujo, <corsetti@itelcad.it>

aŭ
la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg,
176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando,
tel. +31-10-436 1044, faksilo: +31-10-436-1751
<uea@inter.nl.net>

Interredaktore

Petro CHRDLĚ,
<chrldle@kava-pech.cz>

Interredaktore

LEGOLIBRO DE BETTY SALT

Lito apud la fenestro. Betty SALT (1907-1994). Ilustrita de F.L. VEUTHEY. Rotterdam: UEA 1999. 111 p. ISBN 92 9017 068 9. 21 cm. EUR 4,80. Triona rabato ekde tri ekz. ĉe UEA.

La kanada esperantistino Betty SALT (1907-1994) konatiĝis dum sia vivo kiel entuziasma loka aktivulo kaj grandanima mecenato de la Esperanto-movado. Ŝi estis dotita ankaŭ per la talento verki, kion atestas *Lito apud la fenestro*, postlasita kolekto de ŝiaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, ĵus eldonita de UEA.

Multajn el siaj temoj Betty SALT ĉerpis el siaj spertoj kiel instruistino kaj el la kanada historio. Ofte ŝiaj tekstoj spiras la freŝan aeron de la kanada naturo, ĉar ili disvolviĝas meze de la vastaj arbaroj kaj prerioj de Kanado. Stile belaj, ili posedas ĉarmon kiu facile kaptas ankaŭ malpli spertan leganton, dank' al la relative facila lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco de siaj tekstoj *Lito apud la fenestro* bone taŭgas kiel progresiga legolibro.

Francisco L. Veuthey provizis la libron per bela kovrilo kaj internaj ilustraĵoj.

Gazetaraj komunikoj de UEA
Interredaktore

o o o

ESPERANTAJ SINONIMOJ denove haveblas

Esperantaj sinonimoj. Jaan OJALO. Rotterdam: UEA, 1999 (3-a korektita eld.). 96 p. ISBN 92 9017 67 0. 19 cm. Prezo: EUR 7,20. (Triona rabato ekde 3 ekz.)

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭsinonimoj. Por helpi en tio, Jaan

OJALO kompilis la vortaron *Esperantaj sinonimoj*, kies unua eldono

aperis en Estonio en 1985 kaj la dua ĉe UEA en 1993. La populara libro eliris ĵus en tria, korektita eldono.

Esperantaj sinonimoj estas bazita sur *Plena Ilustrita Vortaro* kaj enhavas 1925 kapvortojn. La serĉadon de vortoj simpligas krome 5500-vorta indekso. Temas pri taŭga fonto por ĉiu, kiu volas pliriĉigi sian vortostokon.

Jaan OJALO (1914) estas elstara aktivulo de la estona Esperanto-movado kaj Honora Membro de UEA. Li estas aŭtoro de multaj lerniloj kaj de granda estona-Esperanta vortaro aperinta en 1999.

Interredaktore: Gazetara komunikoj de UEA — n-ro 66

o o o

La lingvoj en Vatikano

En novembro 1999 la germanaj katolikaj episkopoj faris sian regulan viziton en Romo ĉe la papo. Kiun lingvon oni tiam uzas? Evidente tio forte varias. En gazeta raporto (trovita de TRIXINI en *Publik Forum* 1999 N-ro 21, p.35) legeblas ekzemple pri episkopo SPITAL: „La episkopo de Trier nepre ne estas aso en la itala, franca, angla, pola kaj hispana. Sed tiujn lingvojn oni parolas en Vatikano. SPITAL regule venas por la kunsidoj de Pontificium Consilium de Communicationibus Socialibus. Tio estas la papa konsilio pri la komunikiloj.

En tiu Vatikana komunikila konsilio, SPITAL kiel germana episkopo pri la amas-komunikiloj, membras kun voĉdona rajto. Sed SPITAL en Vatikano dependas de la homoj denaske parolantaj la germanan, kaj de la ĝentileco de tiuj Vatikanaĵoj komunikilo-virinoj kaj -viroj, kiuj parolas germane kun la gasto el Trier. Dum kunsidoj oni interpretas. Sed kiam la neformalaj diskutoj fariĝas ardaĵ, SPITAL lingve staras ekster la pordo. Verŝajne ne tro agrabla sperto.

A. BH

Post la sukcesaj konkursoj „Liro-97“, „Liro-98“ kaj „Liro-99“ Urala Esperantista Societo (UES) kaj la redakcio de „*La Ondo de Esperanto*“ invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en „Liro-2000“.

Kadre de „Liro-2000“ okazos kvar konkursoj.

1. „Originala prozo“: ajnatema novelo kun amplekso ne pli ol 20 mil literoj (tajperoj);
2. „Originala poezio“: la temo kaj amplekso ne estas limigitaj;
3. „Traduka prozo“ el la rusa lingvo: novelo de Anton ĈEĤOV „Sapogi“;
4. „Traduka poezio“ el la rusa lingvo: poemo de Sergej JESENIN „Ustal ja ĵitj v rodnom kraju...“.

En ĉiu el la originalaj konkursoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj.

Bonvolu sendi tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo ĝis la 1a de oktobro 2000 je la adreso RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj de „Liro-2000“ ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2002 publikigi la ricevitaĵojn en „La Ondo de Esperanto“, libroforme kaj elektronike, kondiĉe ke ili avertos pri tio la aŭtoron ĝis la 1a de februaro 2001.

Bonŝancon!

Adreso: RU-620014, Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando

Telefono: (3432) 281711

Retadreso: <sezonoj@mail.ru>

http://www.sezonoj.itgo.com

Interreta mesaĝo

Universitata lernolibro Esperante

Jam de pli ol dek jaroj Walter KLAG iniciatis verkon kaj aperigon de universitata lernolibro pri fiziko Esperant-lingve. Tuj mi proponis ke anstataŭ ampleksa libro estu aperigitaj libroj pri unuopaj ĉapitroj de fiziko. Mi entreprenis la verkon de libro pri optiko.

Post multaj problemoj, malfacilaĵoj la unua libro, pri optiko, kiel studenda, korektenda (lingve, fake) materialo estas preta. Ĝi estas verkita por komencantaj studentoj. Matematikajn deduktojn nur malofte mi uzis; ili estas kompreneblaj per kono de gimnazia matematika materialo.

Pluraj ĉapitroj, ekzemple „Klarigo pri naturaj fenomenoj“, „Funkciado de okuloj“, ktp. estas legeblaj kiel sciencopopularigaj artikoloj. Tial ili estos interesaj ne nur por fizikistoj.

Tamen mi deziras, ke la materialon laŭeble pluraj fakuloj (ankaŭ okulkuracistoj) studu, kaj komuniku al mi la rimarkojn pri eraroj, kritikojn, proponojn. Uzante ilin, mi esperas, ke mi sukcesos fari bonan optikan lernolibron. Krom la studentoj espereble ĝi estos utila ankaŭ por Esperanto, demonstrante ke la lingvo estas uzata ankaŭ por fakaj celoj.

Krome mi esperas, ke post lego de tiu ĉi artikolo eklaboros ankaŭ aliaj kunlaborantoj, kiujn varbis Mati LAHTINEN por verki ceterajn ĉapitrojn de la fiziko.

La libro estas trovebla en la reto ĉe:

http://www.hungary.net/esperanto/libroj/optiko.zip

kaj post maldensigo estas legebla en HTML-legilo (Explorer aŭ Netscape). La informojn koncerne la temon mi petas sendi al mia adreso:

Janos SARKÖZI Pf 127
HU-2600 Vac, Hungario

[NDLR: Kaj pri teologio?]

DAŪRIGO DE LABOROJ SUPER ADORU

Tre intense daŭras la prepara laboro por la planata ampleksa liturgia libro. Pastro Albrecht KRONENBERGER per sia muzikskriba komputila programo prilaboris jam tre multajn kantojn kaj igis ilin prespretaj. Kun Adolf Burkhardt ripete okazas plurtagaj laborkonferencoj, en Kloster Kirchberg, en St. Lioba en Freiburg, en Freudenstadt, en Bad Boll. Alproksimiĝas la tempo kiam necesas definitive subskribi la kontrakton por certigi la favoran oferton de la eldonejo. Estas grava kuraĝigo por la kunlaborantoj, ke jam multaj reagis al nia alvoko por krei la materian bazon por la realigo de nia ambicia plano. Ni bezonas multajn, kiuj rakontas al aliaj, kaj multajn kiuj malfermas sian manon por kontribui al tiu komuna entrepreno, komparebla nur kun la apero de la Esperanto-Biblio en 1926. Tiam du anglaj kvakerinoj, Algerina kaj Priscilla Peckover, donacis al la Brita kaj Alilanda Biblia Societo en Londono kaj Edinburgo la monsumon bezonatan por la presigo. Nuntempe, la projekto larĝe transpaŝus la eblojn eĉ de tre grandanima individuo. Tial ni plene dependas de la komuna agado de multaj. Plej bone, se vi ne plu diros: «Ili preparas kantlibron», sed klare «ni preparas kantlibron».

A. BH

Diskonigenda

<http://www.geocities.com/c_piron>
Dokumentoj de Claude PIRON en la angla kaj franca.

<<http://www.esperanto.se/nun/>>Tuja informado en kaj pri Esperanto, senpaga abono (600 signoj por la teksto + 50 por la titolo).

Henri MASSON
esperohm@club-internet.fr

KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

La estraro de la Akademio de Esperanto informas ĉiujn esperantistojn, kaj ĉefe redaktantojn de revuoj kaj ĵurnalistojn/verkistojn, ke la servo „Konsultejo de la Akademio” estas je ilia dispono por solvi lingvajn dubojn en mallonga tempo.

Se vi havas problemojn pri nomado de novaj aĵoj/aferoj, se vi havas dubojn pri la signifo de difinitaj vortoj aŭ se vi volas klarigojn pri difinitaj punktoj en la gramatiko de Esperanto, ne nur cerbumu tutsola, sed sendu mesaĝon aŭ leteron al la gvidanto de la Konsultejo:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanujo
retadreso: <maul@newsfactory.net>

Vi ricevos respondon de la plej spertaj lingvo-uzantoj. La Akademio de Esperanto estas lingvo-instanco, kiu servas la Esperanto-publikon.

Amike

Akademio de Esperanto, La estraro
Interredaktore

ANKAŬ ĈI-JARE PLI OL 7000 INDIVIDUJ DUJ MEMBROJ EN UEA

La individua membraro de UEA en 1999 superis 7000 la 24-an de novembro. Precize, UEA havis tiutage 7010 individuajn membrojn en 118 landoj. La fina nombro estos ankoraŭ pli alta, ĉar kotizoj konstante fluas al la Centra Oficejo. Kvankam estas konsilinde pagi la kotizon kiel eble plej frue, oni ja rajtas kotizi kiam ajn kaj ricevi la jam aperintajn eldonaĵojn de UEA kaj, en kazo de junaj membroj, tiujn de TEJO.

La individuaj membroj de UEA nombras konstante pli ol 7000 ekde la Jubilea Jaro 1987.

Interredaktore
Gazetaraj komunikoj de UEA

Paketradio: nova speco de transsendado de informoj kaj de komunikado

J. WOZNICZKA (DE)

Enkonduko

En la Lastaj jaroj disvastiĝis paralele kun Interreto (*Internet*) la invento nomata angle *Packet radio*, en Esperanto „Paketradio”, kiu funkcias simile al la Interreto, sed ne bezonas esti Ligita kun la telefona reto, ĉar ĝi uzadas la radioondojn kiel kondukilojn, do laboras sendrate.

Tiun ĉi komunikadosistemon oni povas uzi sur la ondobendo de 11 m de la tiel nomata CB-radio en la proksima ĉirkaŭaĵo kun potenco de maksimume 4 W (tio ne bezonas specialan licencon), aŭ sur la benoj de 70 cm aŭ 2 m, se la uzanto estas licenciigita radioamatoro.

La dua ebleco permesas komunikiĝi eĉ tutmonde tra nodoj, tiel nomataj digipiteroj (angle: *digipeater*). Ambaŭ sistemoj estas neprofesiaj, do kvazaŭ hobiaj. Ili tre bone taŭgas por disvastigi Esperanton en skriba formo. La CB-sistemon la aŭtoro jam priskribis en la artikolo sub la titolo: *Paketradio: mirakla komunikadorimedo*, kiu estas aperinta en numero 168 de *Scienca Revuo*, Vol 47 (1996), p. 52-55.

Konciza priskribo do Paketradio (PR)


PR konsistas el IBM-kongrua komputilo (povas esti nedomoderna aŭ simpla), el hejma aŭ movebla radiostacio kun frekvenco en la 70-cm-aj ondoj kaj modemo aŭ stacia noda direktilo (angle: *terminal node controller, TNC*), kiu transformas la ciferojn venantajn el komputilo en aŭdeblajn signalojn por amplifiki ilin kaj sendi ilin en la eteron pere de supermallongaj ondoj fare de radiostacio tra anteno.

Dum ricevado de informoj la modemo, respektive TNC funkcias inverse: ĝi trans-

formas la aŭdsignalojn venantajn de alia kunligita PR-radiostacio en ciferajn signalojn, nome nuloj (0) kaj unu-oj (1) uzatajn en la cibernetiko.

La vorto „paketo” signifas ĉi tie, ke la informojn tajpitajn en la komputilon sur ĝia klavaro, la radiostacio sendas parte po unu linio aŭ po unu frazo: ĝuste kiel „paketo da informoj” — en la eteron tra la anteno. Tiuj paketoj estas elsendataj dum la paŭzo — momento de silento sur elektita frekvenco.

La paketoj estas sendataj kun tre granda rapideco: 1200, 9600 (kaj nun eĉ pli) da baŭdoj (unu baŭdo estas unu bito da informoj en la sekundo). Inter la unuopaj elsendaĵoj la frekvenco estas libera je dispono de aliaj stacioj. Normale ĉiun tajpitan frazon oni finas per puŝo de klavo *Enter* kaj tiam la frazo estas bindita en unu paketon kaj forsendata al elektita, konektita stacio. Tiu ĉi frazo preskaŭ tuj aperos sur la ekrano de tiu stacio, kies uzanto tralegos ĝin kaj povas sendi respondon en la sama maniero.



La radio-turo en Gliwice

Sekretaria Jarraporto pri la jaro 1999

Ankaŭ tiun ĉi jaron kuŝas sur miaj ŝultroj la devo prezenti la sekretarian jarraporton. Sed ...kion mi povas raporti? Nur du personoj sendis al mi mallongan raporton pri la agado en siaj landoj. Ilin mi kore dankas. Mi estas certa ke en pli da landoj estas aktivecoj pri kiu, bedaŭrinde, la KELI-anaro ne estas informita. Reciproka informado povus esti tre instiga. Bonvolu sendi viajn informilojn, revuoj, k.t.p. al mi. Bedaŭrinde malkreskis la nombro da estraranoj. Tiu evoluo estas malbona rilate nia internacia laboro kaj kaŭzas zorgoj al mi. Novaj estraranoj estas ege bezonataj por vigligi nian unuigan vivon. Vi nepre ne pensu ke aliulo ja devas fari la laboron. Vi ĉiuj estas petataj serĉi estraranojn. Mi jam plurfoje petis al, laŭ mi, kompetentaj personoj membriĝi la estraro. Sed vane. Internacia unuigo bezonas internacian estraron por vivteni.

Dank'al la redaktora laboro de Philippe COUSSON kaj la zorga kunlaboro de la eldonisto de *Dia Regno*, Kazimierz LEJA, ni estis informitaj pri eventoj en nia ligo. La redaktoro volonte akceptas sciindaĵojn. Ankaŭ fotoj estas bonvenaj.

David FEATHERSTONE prilaboris la *Estraran Bultenon* kaj ĝi denove estis valora ligilo inter la dise loĝantaj estraranoj kaj reprezentantoj. Ni serĉas posteulon de li.

Ankaŭ la sekretariino serĉas posteulon. Mi fariĝis sekretariino en la jaro 1981. Dum la jaro mi ricevis leterojn el la plej diversaj landoj de la mondo. Ni gajnis novajn membrojn sed ankaŭ perdis membrojn. Al homoj kiuj petas informojn mi ĉiam sendis *Dia-n Regno-n* ĉar mankas al mi bona informilo.

Diservoj

En la kadro de la Faulhaber Semajnfino organizita de Esperanto **Nederland** okazis Dimanĉa matena edifo en la preĝejo de la kongresejo. Jam dum jaroj ni

kongresas en kongresejo de la Mennonitoj en bela arbara regiono. Ni estas dankemaj ke Jacques TUINDER estis preta gvidi la edifon. **Britio:** En Bournemouth, Bristol, Londono kaj Norda Kimrujo okazis monataj Diservoj. En la kadro de la Brita Esperanto-Kongreso en Newport, je la Paska semajnfino, okazis Diservo. Je la 11-a de julio estis la Londona Diservo dediĉita al la rememoro de Joan DAWSON kiu mortis la 30-an de majo 1999. **Germanio:** La kongresa Ekumena Diservo en la kadro de la 840a Universala Kongreso okazis Dimanĉon, la 1-an de aŭgusto en la St. Marienpreĝejo en Berlino. La temo estis „Festo de Dankemaj Homoj”. Kunlaboris inter alie pastoro Adolf BURKHARDT. Kadre de la „Germanaj Ekleziaj Tagoj” inter la 16-a kaj la 20-a de junio okazis Ekumena Diservo en la malnovkatolika preĝejo en Stuttgart. Gvidis pastro WALTER (Malnov-Katoliko), pastro KRONENBERGER (IKUE), Adolf BURKHARDT-(KELI). Orgenludis Ernst LEUZE. **Svedio:** Je pentekosta Dimanĉo okazis edifo en la kadro de la Sveda Esperanto-Kongreso en salono de la kongresejo. Gvidis Arne LUNDKVIST, solkantistis Britta REHM akompanate de Birger VIGGEN. Agneta JÄHRLSTRÖM ludis la violonon. Leif NORDENSTORM sendis predikon. **Ekumena Kongreso.** En la kadro de la Ekumena Kongreso en Gliwice okazis pluraj Diservoj. Dimanĉmatene ni partoprenis Evangelian Diservon en Luterana preĝejo. Predikis pastoro Adolf BURKHARDT kaj orgenludis Ernst LEUZE. Vendrede gvidis Jacques TUINDER Ekumenan Diservon.

El la sekcioj

La jarkunveno de la **Nederlanda** sekcio okazis la 20-an de marto en Utrecht. Post la matena jarkunveno sekvis distra programo

al kiu pluraj membroj kontribuis per prelegoj kaj vojaĝrakontoj. Komence de la jaro 2000 nia sekcio havis 32 membrojn de KUNE/KELI, 5 nur de KELI, 1 nur de KUNE kaj 4 familiaj membroj. La plej multaj el niaj membroj ne plu vizitas kunvenojn pro siaj aĝoj. Estraro: sekretario: Els VAN DIJK; kasisto: Gerda DERCKS; membroj: Nel VAN IPEREN kaj Leen HORDIJK. Fine de la jaro 1999 havis la **Finna** sekcio 34 membrojn. Inter ili estas 2 familiaj membroj kaj unu honora membro. Estis 13 membroj kiuj ne abonis al *Dia Regno*. Okazis kunvenoj en Tampere dum la vintro kaj aŭtune en Helsinko. Estraro: Olavi KANTELE, prezidanto; Matti PERSONEN, vicprezidanto; Soilo SALMINEN, kasistino; aliaj estraranoj: Heta KESÄLÄ, Heli YRTTIAHO. Oni sendis 4 informilojn. Bibliaj rondoj kunvenis en Helsinko kaj Lahti.

En **Litovio** aktivas Erikas LAICONAS. Li transprenis la respondecon por „**Esperanto Misio**” kun helpo de Esperanto-grupo en Kaunas. Post la Ekumena Kongreso estis materialoj transportitaj al la Pola/Litova landlimo kaj de tie ĉion estis transportita al Kaunas.

La jarkunveno de la **Germana** sekcio okazis la 1-an de aŭgusto. Prezidanto de la sekcio estas pastoro Lothar BAUMGARTEN, sekretario estas Hella LANKA kaj kasistino Astrid HANKE. La Germanlingva „*Ökumenisches Esperanto Forum*” eldoniĝis dank'al pastoro Adolf BURKHARDT kaj pastoro Bernhard EICHKORN. Ĝi estis regule sendita dank'al Endel OJASILD el Estonio. Pastoro Adolf BURKHARDT kunlaboris kun multaj aliaj en plia ekumena agado nome: la verkado de oficiala Diserva Libro de IKUE kaj KELI kies titolo estas „*Adoru*”. Dum la „Ekleziaj Tagoj” en Stuttgart estis Esperanto stando.

Larisa KUZMENKO restis la reprezentantino por **Rusio**. Dum la jaro 1999 estis 15 membroj precipe per-literaj kontaktoj. La ekonomia situacio malpermesas vojaĝi, aboni gazeton aŭ viziti eĉ parencon ekster

la urbo. La Kristanaj Esperantistoj ĝojas pri la alsendado de *Dia Regno*. La klubanoj de la loka Esperanto Klubo gvidis kursojn por infanoj kaj subtenis la lokan orfejon.

La **Sveda** Jarkunveno okazis dum la Pentekosta semajnfino en Lesjöfors. Dum tiu kunveno la membroj reelektis kiel estraranojn Karl BUREMO, Stig KINNANDER, Arne LUNDKVIST. Ili restas ĝis la jarkunveno en la jaro 2000. Reelektitaj por 2 jaroj estis Agneta JÄRLSTROM (sekretario) kaj Birger VIGGEN. „*Medlemsbladet*” aperis 4 fojojn jare. Redaktantoj estis Arne LUNDKVIST kaj Karl BUREMO. Je la jarfino 1999 la Sveda sekcio havis 53 membrojn. El tiuj 5 estas familiaj membroj kaj 8 dumvivaj. La sekcio krome havis 23 personojn kiuj nur ricevis „*Medlemsbladet*”.

En **Britio** estis Peter kaj Audrey HAYWARD la redaktantoj de „*Kristana Alvoko*” kiu aperis 4 fojojn jare. La jarkunveno okazis la 3-an de aprilo. Estraro: prezidanto, David BISSET; kasisto, Tom NEIL; sekretario, Yvonne KNOWLES; redaktoroj, ges-roj HAYWARD; membroj: David FEATHERSTONE, Bruno NAJBARO, Edith SHEDRICK.

Finiĝas mia raporto. Se vi opinias ke mankas interesaj informoj, bonvolu sendi ilin rekte al la redaktoro. Adresŝanĝoj sendu rekte al la kasisto aŭ al via lando sekcio. Laste, mi esperas renkonti multajn el vi dum nia Kristana Kongreso en Ĉefio.

Els VAN DIJK

Estraro de KELI: (inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo). Adolf BURKHARDT: prezidanto (2000); Philippe COUSSON: redaktoro kaj vicprezidanto (2000); Els VAN DIJK: sekretario (2001); Siegfried KRÜGER: kasisto (2002); **membroj:** Jacques TUINDER (2002), Éva FARKAS (2000); MA Youngtae (2001); Britta REHM (2001); Arne LUNDKVIST (2000), David FEATHERSTONE (2000); Pavel POLNICKY (2002).

Gazetara Komuniko

IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kongresos en Italio de la 2a ĝis la 8a de septembro 2000. La **Kongreso** estos partopreno en la **jubileo**, kun pilgrimo/vizito al kelkaj gravaj jubileaj lokoj. La Kongreso okazos en Rimini, ĉe la adriatika strando, kun tagaj vojaĝoj al Loreto — Asizo — Gubbio — La Verna kaj Romo. La Kongreso estos ĉefe religia, ne mankos turismaj kaj distraj momentoj. Ĝi estas malfermita al ĉiuj, ankaŭ alireligianoj, kiuj deziras ekkoni la signifon de la jubileo kaj de pil-

grimado laŭ la katolika tradicio. Prezoj varias laŭ datoj, lando, elektota loĝado. Ene de majo, la kongresa kosto (kiu inkluzivas ĉion — loĝado en dulita ĉambro, vojaĝoj, programo, manĝoj, krom trinkaĵoj) estas 360 eŭroj por landoj „A” (laŭ klasifiko de UEA) kaj 150 eŭroj por landoj „B”. Specialaj tarifoj por kongresanoj el Ĉeĥa Respubliko, Pollando kaj Slovakio. Rabatoj por gejunuloj!

Petu informojn al <c.sarandrea@agora.stm.it>

Carlo SARANDREA

De la legantoj...

Kara Filipino,

gratulon pro DR 1-2/2000; la nova vesto de la revuo (nun kun pli abunda enhavo) ege plaĉas al mi. Jam ofte mi pensis, ke estus pli bone eldoni la gazeton nur ĉiun duan monaton, sed pli bele kaj kun pli multaj paĝoj.

Eta korekto (de korekto): Jam en decembro ni finfine decidis NE ŝanĝi la JET-datojn; la informo sur p. 21 „Letero pri JET 2000” do estas malĝusta. Indus do korekti la korekton.

Pri paĝo 22: Mi pensas, ke en decembro (aŭ januaro) mi dissendis pere de la IKUE-listo pli aktualan version de la informoj pri la Katolika Foiro. Ĝin ĵus represis *Espero Katolika*.

Amike

Ulrich MATTHIAS

Ulrich.Matthias@t-online.de

o O o

Mi ankaŭ havis similan senton (agrabla). Verŝajne tro abundas artikoloj el la ĝenerala E-movado, sed mi komprenas ke manke de artikolistoj, redaktoro devas ĉiuokaze elturniĝi. Gratulojn, do, por la nova vivo de Via revuo.

Carlo SARANDREA

Estimataj,

Hieraŭ mi ricevis mian ekzempleron de la januara-februara numero de *Dia Regno*. Gratulon! Vi faris tre bonan laboron — ĝi elstare aspektas. Plia surprizo por mi estis vidi en ĝi mian artikolon (tradukon) pri Oswald Chambers kaj la anoncon pri mia nova TTT-ejon sur la interreto.

Ĉion bonan ankaŭ por la venontaj numeroj. Amike via,

Jerry VEIT

o O o

Mi jam ricevis novan, de Vi majstre eldonitan Dian Regnon en la bela formato A 5 — ĝi tre plaĉas al mi! Gratulon!
Salutojn de Jozefo el Eschwege!

o O o

Kara frato Kazimierz, kun ĝojo mi ricevis la unuan numeron de *Dia Regno* en nova formato. Ĝi tre plaĉas al mi. Mi kore dankas kaj gratulas al Philippe kaj al vi pro la bona laboro.

Kore via

Adolf BURKHARDT

Silaba krucvortenigmo

1	2		3		4	5	6
7			8			9	
10		11		12			
		13	14			15	
		16					
17				18			

Kromsolvo

1	10	9
---	----	---

horizontale: 1. kardinalkunveno, 4. tre mal-mola, 7. nikso, 8. laŭtigi la voĉon, 9. helmalve, 10. plen-sono, 12. diservaranĝo, 13. brutal', 15. narkotaj', 16. aŭtoparkeja, 17. jarparto, 18. konstrustilo.

vertikale: 1. pekdeklaro, 2. Jerusalema monto, 3. kokinprodukto, 5. dikredo, 6. ŝveb-fluganta sudazia mamulo, 11. konvertiĝanto, 14. ĝoja aklamado.

kromsolvo: mildigi kaj resperigi.

Fritz LAUTENBACH

Solvo el la numero 820

horizontale: 1. episkopo, 7. diet', 8. leo, 10. loĝi, 12. em, 13. pi, 14. ie, 15. zono, 17. Arn', 18. inde, 19. oratorio.

vertikale: 1. eklezio, 2. ido, 3. si, 4. KELI, 5. oto, 6. oriento, 9. emo, 11. ĝir', 13. pont', 16. nia, 17. aer',

kromsolvo: diakono.

365 TAGOJ EL LA BIBLIO

Ekzemplo kaj informo

Dimanĉon, la 13an de februaro 2000

Jen la hodiaŭa mesaĝo por vi el la Biblio: *Metu vian ŝarĝon sur la Eternulon, kaj Li vin subtenos; neniam Li lasos fali piulon.*

Psalmo 55:22

PREGŬO: Kara Sinjoro, benu nin hodiaŭ dum via sankta tago. Vi donis la dimanĉon kiel donacon al la homaro, por ke ni ripozu kaj ĝuu la tagon. Helpu nin, ke dum tiu ĉi benita tago ni bone ripozu kaj forgesu pri niaj normalaj ĉiutagaj zorgoj. Niaj pensoj restu sur vin, kiu ripozigas nin kaj donas al ni novan forton por la venonta semajno. Amen.

Jerald VEIT

Kristana Inform-Centro


ANONCETO: Okazis kelkaj ŝanĝoj al la hejmpaĝo de „365 Tagoj el la Biblio”. La formato iomete ŝanĝiĝis kaj mi aldonis la ĉeĥan kaj polan lingvojn al la lingvolisto por la semajna legaĵo el la Biblio. Se vi havas aliron al la interreto, vizitu nin ĉe:

<<http://www.execpc.com/~jveit/>>

Koran dankon pro via intereso!

Els VAN DIJK

Provizora Programo de la 50 KELI-Kongreso 5–12.08.2000 Janské Lázně



Nia kongresejo

Ĉiutage: 7.30 matena preĝo
8.00 matenmanĝo
9.00 kantado

10.00 prelegoj
12.30 tagmeza preĝo
13.00 tagmanĝo
14.00 prelegoj
16.30 dancado
18.00 vespermanĝo
19.00 vespera programo
21.30 tagfina preĝo

Sabato – 5.08. akcepto kaj loĝigo

14.00 trarigardo de la urbeto Janské Lázně
16.00 malfermo de la ekspozicio „De J. A. Komenský ĝis L.L.Zamenhof”

19.00 Interkona vespero

Diamanĉo – 6.08.

Diservo kun la Sankta manĝo
Oficiala malfermo de la kongreso

14.00 prelego pri Jan Amos Komenský
16.30 malfermo de la ekspozicio de la pentraĵoj kun la kristanaj motivoj de nia membro Vaclav Lamr

19.00 koncerto: Antonin Dvorak – Bibliaj kantoj (en E-o)

Lundo – 7.08

10.00 prelego pri la ĉeĥa verkisto Karel Čapek
11.00 prelego pri ĉeĥa poeto Karel Hynek Macha

14.00 duontaga pieda ekskurso
19.00 amuza konkurado de internaciaj teamoj

Mardo 8.08

10.00 prelego pri ĉeĥa verkistino Božena Němcová

19.00 distra vespero – partoprenas ĉiuj aktive

Merkredo – 9.08

9.00 tuttaga busa ekskurso: KUKS – skulptaĵoj kaj plastikoj de Matyas Braun (en naturo)
Ratiborice – kastelo kaj malnovaj tipaj konstruaĵoj
Nachod – kastelo

Ĵaŭdo – 10.08

9.00 Jarkunveno (laŭ bezono eĉ posttagmeze)

19.00 koncerto – operaj kaj operetaj arioj

Vendredo – 11.08

19.00 Adiaŭa vespero kaj oficiala fermo de la kongreso

Sabate matene – forveturo de la kongresanoj.

o o o

Listo de la aliĝintoj (15. 4. 2000)

50-a kongreso de KELI, Janské Lázně, Ĉeĥio

22. HORDIJK Leendert, Nederlando
23. HORDIJK Sietske, Nederlando
24. GRAJEK Maciej, Pollando
25. LUNDKVIST Arne, Svedio
26. KRIVÁNKOVÁ Radka, Ĉeĥio
27. OLUWABUNMI Osho-Davies, Nigero
28. SCHÄFER Willi, Germanio
29. POSPÍŠIL Václav, Ĉeĥio
30. van der KOOIJ-WAAL Rie, Nederlando
31. DIMITROV Christo, Bulgario
32. RICHTER Ursula, Germanio
33. KANTELE Olavi, Finnlando
34. STAMM Sieglinde, Austrio
35. KASZAB Elizabeta, Hungario
36. FEATHERSTONE David, Britio
37. FARKAS-TATÁR Eva, Hungario
38. SOMHEGYI Zoltán, Hungario
39. BÁNÁTI Katalin, Hungario
40. ANTOŠ Oldřich, Ĉeĥio.